

## PORTANTE NIAN KRUCON

Kiam Jesuo instruis siajn disĉiplojn pri la neceso porti ilian krucon, li uzis tre fortajn vortojn:-

*'Kiu ne prenas sian krucon kaj sekvas post mi, tiu ne estas inda je mi.'* (Mt.10:38)

*'Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, kaj levu sian krucon kaj sekvu min.'* (Mt.16:24)

*'Kiu ne portas sian krucon kaj ne sekvas min, tiu ne povas esti mia disĉiplo.'* (Lk.14:27)

Estas rimarkinde, ke ĉiu el tiuj diroj estas pli forta ol la antaŭa, kvazaŭ konduki nin paŝe al la lasta, kiu estas absoluta, neevitebla fakto. Nepre necesas, ke disĉiplo portu sian krucon kaj sekvu Jesuon.

Kiamaniere ni faru tion? Homoj ofte emas diri, kiam ili suferas malsanon aŭ malfacilaĵojn "Ho, tio estas mia kruco, kiun mi devas porti!", sed la vortoj ne povas tion signifi. Malsanon kaj suferojn ni ne povas eviti, kaj kvankam elteni tiajn paciente estas aprobinda, tio ne estas porti nian krucon. Unue ni devas ĝin preni; tio estas volonta, libervola ago. Simile levi kaj porti ĝin postulas intencan agon niaparte.

La sola kialo por kiu oni prenas krucon estas por esti krucumita. Jesuo, nia ekzemplo, libervole iris al sia krucumo, '*... mi demetas mian vivon ... neniu ĝin forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole.*' (Jo.10:17-18) Evidente Jesuo ne volis diri, ke ĉiu disĉiplo devas esti laŭlitere, fakte krucumita, kvankam multaj ja tion suferis dum la unua jarcento. Por ekkompreni tiujn dirojn de Jesuo nepre necesas rigardi la antaŭajn vortojn; tiel oni konstatas la kuntekston en kiu li parolis. En Mt.16 ĵus antaŭ v.24 ni legas, ke Petro agis kiel kontraŭulo (Satano), penante persvadi Jesuon, ke tiu ne submetiĝu al la volo de Dio. Jesuo devis admoni lin, dirante, ke li ne havis pensojn laŭ Dio, sed laŭ homoj. Tial ni povas kompreni, ke levi nian krucon signifas anstataŭigi nian propran volon kaj niajn pensojn kaj emojn, per la volo kaj pensoj de Dio. Tio estas la signifo de 'abnegacio' en v. 24.

Praktike tio signifas, ke ni devas demeti niajn naturajn emojn kaj taksojn, eĉ se pro tio ni suferas la malaprobon de homoj. La kunteksto de Mt.10 kaj Lk.14 provizas trafan ekzemplon ĉar ĝi estas afero de nia natura amo por niaj familianoj.

*'Kiu amas patron aŭ patrinon ... filon ... filinon pli ol mi , tiu ne indas je mi.'* (Mt10v.37)

*'Se iu venas al mi, kaj ne malamas sian patron ... patrinon ... edzinon ... infanojn ... eĉ ankaŭ sian vivon, li ne povas esti mia disĉiplo.'* (Lk.14:26-27)

Jesuo ja ne volis diri, ke ni fakte malamu iun ajn, ĉar ni scias, ke la plej grava ordono estas ami Dion kaj nian proksimulon. Li instruas metafore, ke ni taksu lin pli alte ol niaj naturaj familioj; ni devas ne permesi al iu trudi inter ni kaj Dio. Tian mensan sintenon Jesuo mem montris; kiam liaj patrino kaj fratoj ne kredis al li kaj volis malhelpi lian laboron, li sin forturnis de ili kaj diris:

*'Kiu ajn faros la volon de Mia Patro ... tiu estas mia frato ... fratino ... patrino.'* (Mt.12:46-50)

Tio signifas, ke niaj gefratoj en Kristo devas esti al ni pli gravaj ol niaj naturaj parencoj, kiuj ne estas kredantoj. Ege malfacile! Tia mensa sinteno estas tute kontraŭ natura, kaj certe

malaprobinda laŭ la plejmulto da homoj. Sed estas precize nian homan naturon, kiun ni devas venki; principo, kiun ni devas apliki al ĉiuj aferoj de la vivo. Paŭlo diris:

*'tiuj, kiuj apartenas al Kristo, jam krucumis la karnon (homan naturon) kun ĝiaj pasioj kaj voluptoj ... ni ne fariĝu fanfaronemaj ...'* (Gal.5:24-26). Tiujn 'pasioj' li jam priskribis en la antaŭaj versoj 19-21.

Penante rezisti nian naturan emon sinkonduti laŭ malpureco, malamikeco, malpaco k.t.p., ni portas nian krucon. Anstataŭ tio ni devas klopodi montri en nia vivo la fruktojn de la Spirito: **amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco kaj sinregado.** (v.22-23) Paŭlo plue diris: *'por mi ne estu fanfaronado krom pri la kruco ... per kiu la mondo estas krucumita al mi, kaj mi al la mondo.'* (Gal.6:14) Sed legu la kuntekston en v. 12-13, kie li admonis tiujn, kiuj pensis, ke obeado de la eksterajoj de la Mosea leĝo savos ilin. Jen plua homa emo: pensi, ke ni saviĝos per niaj faroj. Tio estas homa fiero, kiun ni devas 'krucumi', ĉar ni saviĝos sole per fido al Jesuo. Paŭlo plue klarigis: *'Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno (homa naturo), mi vivas en fido al la Filo de Dio.'* (Gal.2:20-21)

Je nia bapto ni ekprenis nian krucon:

*'ni ... estas entombigitaj kun li per bapto al morto ... nia malnova homo estas kun li krucumita, por ke la korpo de peko estu neniigita.'* (Rom.6:4-6)

La praktika signifo de tio malsimilas por ĉiu disĉiplo ĉar ĉiu havas sian propran 'krucon'. Por la juna riĉulo Jesuo diris, ke estis lia riĉo; por li la riĉo malhelpis lian fidon al Dio, do por preni sian krucon li devis tion demeti. Riĉo mem ne estas malbona; eblas esti riĉa tamen fidela al Dio, sed riĉuloj emas fidi al siaj riĉoj anstataŭ al Dio. (Mk.10:24) Paŭlo mem devis ne nur demeti la potencon kaj prestiĝon de sia kariero, sed sin submeti al malaprobo, persekuto kaj multe da laboro kaj sufero, kiun li trafis dum sia vivo de servado al Jesuo.

Tiuj du ekzempleroj, unu sukcesa, la alia ŝajne ne, indikas la neceson por tuta ŝanĝo en la vivo; tiu devas komenci per ŝanĝo en la mensa sinteno. Tia ŝanĝo ne ĉiam estas rapida sed devas fine esti tuta. Estas vivdaŭra batalo, kiun Paŭlo elokvente priskribas en Rom.7, batalo, kiun ni mem ne povas venki, sed *'danko estu al Dio'* ke per Jesuo kaj kiel li, ni povas esti liberigitaj. Ni devas ŝanĝiĝi kiel la juna filo en la parabolo tiel, ke anstataŭ ol diri *'donu al mi'*, ni petos Dion ke li *'faru min'* tia, kian li volas. (Lk.15:12,19) Ni celas ŝanĝiĝi tiel, ke ni ja volas tion, kion Dio volas. Iom post iom, per nia ĉiutaga legado de la Biblio, ni lernos pri la pensoj de Dio, kaj ni povas preĝi, ke li helpu nin submeti nian propran volon al lia volo. Kiam ni prenas la panon kaj vinon ni celebras la finan venkon de Jesuo super sia volo. Jen nia perfekta ekzemplo. Ankaŭ li devis lerni obeon (Heb.5:7-8) ĝis fine li sukcesis diri *'ne mia volo, sed via ...'* (Lk.22:42). Tiam, *'perfektigite, li fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantaj'*. (Heb.5:9)

Jean Field